

& La vulpo kaj la gruo:

< Rekante 9 el 17 aŭ 18 el 31 batoj por strofo, entute 170 paŝoj dum 2 minutoj aŭ 410 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por Ora Koko kaj alia rekantaĵo. Alternative eblas uzi melodion kaj rekantaĵon de Sigmunda balado.>

(#Melodioj:

((# Ora Koko: <:17> /dore mifa soso somi; rere mimi mire dodo; (#Rekantaĵe: dore mifa soso mi; rere mimi rere doTi La)) ?

(#Sigmunda balado: <:41> /mi mi Idolre mi mi mido re fa; mimi mimi mido re fa; (#Rekantaĵe: mire do; domi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; Somi mimi re do))

)×10)+

(&Strofoj:

'1 /Vulp' invitis al si grupon ; kaj al ĝi promesis ĝuon

(×; ;

(# Unua: (×; ; **Gaje dancu en la rond' ; kaj ni kantu pri bestara mond'.**)?)

(# Alternativa: **En la ĉen' ; dancu nun trankvile ; ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika ĉen' ; dancu nun trankvile.**)

'2 manĝi, trinki plej agrable. ; Tiu venis. Nu, surtable

'3 estis supoj delikataj, ; sed nur en teleroj plataj.

'4 Dum la vulpo do festenis, ; ĝia gasto vane penis

'5 per la longa, pinta beko ; pri elsuĉo aŭ elleko.

'6 Tio la grupon tre incitis, ; ĝi la vulpon reinvitis;

'7 faris kuiradon grandan, ; ĉion bonan, pleje frandan

'8 donis, sed, kun venĝo-volo, ; en botel' de longa kolo.

'9 Sian bekon ĝi enŝovis, ; sed la vulpo vane provis

'10 manĝi el la svelta vazo, ; iris for kun longa nazo.)